



HUNGARA BULTENO

DE

HUNGARIA ESPERANTO-ASOCIO

1146 Budapeŝto, Thököly út 58-60. ✉ hungario@gmail.com

Revuo de Hungaria Esperanto Asocio – 2021/3 – Decembro

BONVENIGO

Karaj legantoj de ĉi tiu n-ro de nia Bulteno, la bulteno ekde tiu ekzemplero aperas en tiu ĉi formo, danke al la afabla propono de Zoltan Barta, kiu donis al mi la bazon.

Mi afable petas niajn legantojn, bonvolu sendi artikolojn al la bulteno por aperigo ankaŭ el la provincaj Esperanto-Societoj por riĉigi la enhavojn de niaj sekvaj n-roj de la bulteno. Antaŭdankon al vi.

Anna Bartek

El la enhavo:

Kio okazis tutmonde?
Kio okazis en Budapeŝto?
Zamenhof tago la 12-an de decembro.
Eŭropaj fervojoj.

Dezirante agrablan legadon!

Kio okazis tutmonde?

Konferenco de la Akademio de Esperanto

Okaze de la Zamenhof-festo, Akademianoj prezentos per *Zoom* konferencon pri diversaj temoj interesantaj kaj la Akademion kaj la ĝeneralan publikon, inaŭgurante novan kontakton inter nia Instituto kaj la Esperantistaro.

Ĝi okazos: Mardon, 14an de decembro, 13h00 – 14h20 UTC (14h00 – 15 20 laŭ mezeŭropa horo)

Probal Dasgupta: Ebloj kaj ebloj en la emfaza ripetado de afiksoj esperantaj

Sergio Pokrovskij: Maltrafoj (Kion mi volis sed ne sukcesis fari en la Akademio)

Javier Alcalde: Socia historio de Esperanto. Kial? Kiel? Kien?

Grant Goodall: Schleyer kaj Zamenhof kiel lingvokreantoj: substantiva morfologio en Volapük kaj Esperanto

Merkredon, 15an de decembro, 13h00 – 14h40 UTC (14h00 – 15h40 laŭ mezeŭropa horo)

François Lo Jacomo: Ĉu modernigi la Akademion?

Aleksandro Shlafer: Kiel la Akademio kontribuu al Vikipedio?

Cyril R. Brosch: La Konsultejo de la Akademio

Bertilo Wennergren: La nun okazanta revizio de PIV, en kiu partoprenas pluraj Akademianoj Carlo

Minnaja: Proklamo de la Laŭro de la Akademio 2021.

La konferenco estos spektebla per *Zoom*: <https://us06web.zoom.us/j/83523650485>

ID de la kunsido: 835 2365 0485

(ankaŭ atingebla telefone, ĉe pluraj telefonnumeroj depende de via lando).

Bonan spektadon!

La estraro de la Akademio



Kalendaraj memorigoj	64a kaj 65a literaturaj kafejoj
<p>La 26-an de oktobro okazis: Kunveno de la klubo de Onjo Eva. Nia prelegantino Perla Mielo faris ege altnivelan prezenton pri la Esperanto Muziko, ni kune kantis konatajn esperantlingvajn kantojn, ankaŭ el la repertoaro de Anjo Amika, kiel „Se mi estus rozo”, „Trovis, mi patrujon”</p>	<p>„Finalo de partio” premiers Zamenhof-Tage 2021 La ĵus eldonita verko „Finalo de partio” de Samuel Beckett estos prezentata en Budapeŝto 15 decembro 2021, okaze de la literatura kafejo organizata de Fajsi Amika Rondo sub la aŭspicio de Esperanta PEN-Centro: gastos la ĉefa tradukinto, d-ino Perla Martinelli.</p>
<p>La sekva kunveno de la Klubo de Onjo Eva disvolviĝis la 30an de novembro 2021 Anna Besenyei.</p>	<p>La literaturaj kafejoj okazadas laŭ la kutima monata ritmo, je ĉiu tria ĵaŭdo: ĉi-foje escepte en merkredo, por koincidi kun la Tago de la Esperanta Kulturo. La sekvonta, 20 januaro 2022, denove en ĵaŭdo, je 18h00, ĉiam ĉe la orienta legacio de la Esperanta Civito.</p>

Eŭropaj fervojoj: historio – nuntempo – estonteco ...

... estis titolo de la dua faka internacia seminario, kiu organizis Universitato Pardubice, Fakultato de Transporta Inĝenierio (UPa), Ĉeĥa Fervojista Esperanto-Asocio (ĈeFEA) kaj Internacia Federacio Esperantisto Fervojistoj (IFEF) la 12-a Oktobro 2021 en Pardubice. Interesajn kaj informriĉajn prelegojn prezentis:

- Rodica Todor el Romanio – Pri IFEF, partnerada projekto Erasmus+ pri daŭripova transporto kaj invito la studentojn kunlabori,
- Tomáš Vašut el Hungario kun Jaroslav Matuška el Ĉeĥio – Komencoj de internaciaj fervojkonektoj en la tempo de vapormaŝinoj. Aŭstria imperiado 1865;
- Jan Niemann el Danio – Akcidentoj kaj epizodoj de poŝvagonoj kaj duonremorkoj;
- Guido Brandenburg el Germanio – Horoj antaŭ bariero. Sekurigo de traknivelaj pasejoj kaj la sekvo por la aŭtomobilistoj;
- Vito Tornillo el Italio – Nuntempaj kaj estontaj (daŭripovaj) instalaĵoj en fervojo;
- Roman Štěrba el Ĉeĥio – Modernigo kaj disvolviĝo de la fervoja infrastrukturo en la Ĉeĥa Respubliko.
- Andreas Diemel el Germanio – La novaj ligoj tra Eŭropo – noktaj trajnoj.

Fine invitis Ladislav Kovář (ĈeFEA) ĉiujn partoprenantojn al la 73-a IFK Beroun (6.-11.5. 2022). Partoprenis 39 interesuloj pri la Esperanto aŭ pri fervojofakaj aferoj. Surloke partoprenis 18 personoj (el Ĉeĥio kaj eksterlando), 21 pere de platformo MS Teams. Inter eksterlandanoj estis 12 personoj el 8 landoj: Germanio (2), Francio (2), Danio (2), Hungario (2), Kroatio, Rumanio, Svedujo kaj Italio.

Seminario okazis kadre de Eŭropa jaro de fervojo 2021. Prelegoj kaj diskutoj estis tradukitaj el Esperanto en ĉeĥan lingvon kaj renverse. Post la seminario IFEF-anoj kaj studentoj komune tagmanĝis kaj babilis.

Platformo MS Teams ebligis aligi eksterlandanoj kaj ĉeĥaj partoprenantoj, kiuj aliokaze nepartoprenis. Eble similaj „hibridaj renkontiĝoj“ povus esti taŭga maniero de partoprenado tiuj interesuloj, kiuj pro la diversaj kialoj ne partoprenus surloke.

Ĉiuj tri organizantoj (UPa, IFEF, ĈeFEA) subskribis (2019) Kontrakto pri reciproka kunlaboro. Similaj seminarioj estas unu el pliaj aktivecoj, kiuj ofertas IFEF kaj ĈeFEA por universitataj studentoj. Alia grava aktiveco rilate studentojn estas projekto Erasmus+ (2021 – 2023, temo: Daŭripova evoluo kaj transporto, kunordiganto: UEA). Ni invitas ĉiujn interesulojn pri la kunlaboro aŭ al venonta seminario Eŭropaj fervojoj aŭ pri la temo daŭripova transporto.

Jaroslav Matuška, jaroslav.matuska@upce.cz, ĈeFEA
(Al la Hungara Bulteno plusendis: d-ro Imre Ferenczy, kunlaboranto)

Transformiĝis la retpaĝo de HEA



Ekde novembro 2021 la retpaĝo de Hungaria Esperanto-Asocio transformiĝis, noviĝis. La Asocio havas novan sistemadministranton, kiu lokigis la tutan retpaĝon je tute nova bazo. Ni diru adiaŭon al la malnova paĝo kun dolora koro, kaj bonvenigu la novan retejon kun bona koro. Vizitu nin, legu niajn (hungarajn kaj esperantajn) paĝojn, kaj se vi havas ion komenton, ne hezitu komuniki ĝin al ni per nia retleteradreso, kion vi trovos ankaŭ sur la nova retpaĝo.

<http://esperantohea.hu>

Informoj pri EHV * Hungara-Esperanta vortaro

1. La kruda versio de la vortaro estas preta. Komenciĝis ĝia ĝenerala kaj faka provlegado.
2. Por la provlegado estas serĉataj pluaj provlegantoj. Oni povas kontroli unuopajn literojn aŭ fakterenojn. Sed estas bonvenaj ĉiuspecaj sugestoj unuopaj por korektoj, kompletigoj. La nomoj de la provlegantoj estos eternigitaj kun aparta danko en la vortaro.
3. Laŭ peto mi sendos por kontrolo la malnetan version de la vortaro aŭ ties unuopajn literojn.
4. La vortaro aperos antaŭvideble en tri variantoj: papera, elektronika kaj telefonaplikaĵa. La papera vortaro antaŭmendeblas ĉe la retadreso esperanto@vortaro.hu. Ĝia ebla apero estas 2022. La e-varianto atingeblos ĉe www.vortaro.hu en pdf-formo. La telefon-apa varianto atingeblos, resp. en provizora formo jam atingeblos ekz. ĉe la retbutikoj Google Play, App Advice, App Store, Ste Primo.

Ajnaj proponoj, ideoj, antaŭenigaj sugestoj estas bonvenaj.

Resumo de memorekscuroj – Ĝisfakto Emléktúrákról

Estimataj Gesamideanoj!

Hungaria Esperanto-Asocio komencis organizi memorekscurojn en septembro 2017, kiu estas parto de la Esperanto-ekskursmovado, kaj estas unika en la mondo. Ĝia mesaĝo estas antaŭenigi sanan vivstilon per regula ekzercado en la naturo, kombinita kun spektakloturniro kun la prezento de Esperantomonumentoj kaj turismaj vidindaĵoj. Ĉi tiuj programoj pruviĝis utilaj por proksimigi homojn eĉ pli kiel la spirita trezorejo de la 120-jara Asocio. Ĝia ĉefa celo estas propagandi Esperanton, kaj krei novan fonton de enspezo.

Prezento kaj reklamado de Esperanto inter familioj kaj gejunuloj okaze de la reklamado. Ĉiuj partoprenantoj estis informitaj pri Zamenhof kaj Esperanto en la itinero-priskribo. Ni sukcese kolektis simpatiantojn kaj subtenantojn el la emerituloj kaj mezaĝaj grupoj.

La fonto de enspezo estis provizita per la enirkotizoj. Ni sukcesis engaĝi la interesigantojn kiel studentojn.

Mi ŝatus danki la multajn partoprenantojn pro ilia kontribuo al la sukceso de la evento. La Budapeŝtaj Turniroj estis la parto de la Budapeŝta Pokalo kaj la

Tisztelt Eszmetársak!

A Magyarországi Eszperantó Szövetség 2017 szeptemberétől kezdett el foglalkozni emléktúrák szervezésével, amely az eszperantó túrazogalom része, és a világon egyedülálló. Üzenete az egészséges életmód népszerűsítése rendszeres mozgással a természetben, teljesítménytúrával összekapcsolva, eszperantó emlékhelyek, turisztikai látványosságok bemutatásával. Bebizonyosodott, hogy ezek a programok az embereket még közelebb hozzák egymáshoz, úgy is, mint a 120 éves Szövetség szellemi kincsesládát. Fő célja az eszperantó reklámozása és új bevételi forrás megteremtése.

A reklám alkalmával az eszperantó nyelv bemutatása és népszerűsítése a családok és az ifjúság köreiben. Minden résztvevő az útvonal leírásban Zamenhofról és az eszperantóról tájékoztatást kapott. Sikeresült szimpatizánsok és támogatók gyűjtése a nyugdíjasok és középkorúak köreiből.

A bevételi forrást a nevezői díjak biztosították. Sikeresült érdeklődőket nyelvtanfolyamainkra hallgatóknak bevonni.

Köszönetet mondok a sok résztvevőnek, hogy hozzájárultak a rendezvény sikeréhez. A Budapest Túrák, a Budapest Kupa és az azt követő TTT Kupa mozgalom

posta TTT Pokalmovado. Sed krom la distancoj la Asocio aliĝis ankaŭ al multaj aliaj pokalmovadoj. Ĉiam estis bona etoso ĉe la evento.

La organizadon ĉiam antaŭas la ideokolektado, organizado de personaro, antaŭorganizado, vojplanado, trairado, kontrolpunktoj, mapopretigo, petado de permeso de la aŭtoritatoj, google antaŭreklamo kaj reklamado, pretigo de budĝeto, monokolektado, teamkonstruado, disdivido de taskoj, administraj farendaĵoj: presaĵoj, akiro de iloj, rezervado de presĉambro, refreŝiga manĝaĵo-trinkaĵo, rubandoj, preparado de sekura loko. Estas grandnombraj labortaskoj kaj dum kaj post la ordigo.

De 2017 ĝis fino de 2021 la Hungaria Esperanto-Asocio organizis 20 memorekskursojn kovrantajn ĉiujn sezonojn, tuŝante plurajn regionojn (Montoj Buda, Montoj Pilis, Montoj Gerecse, Montoj Börzsöny, Montoj Vértes), kie estis vizitataj memorlokoj, ZEO-j (Zamenhof kaj Esperanto). Tiuj estis la Zamenhof statuo kaj memorŝtono en Tabán, Esperanto-fonto en Piliscsév, en la urbo Tata la Esperanto memorŝtono kaj Esperanto-Placo, la Esperanto-Monto kaj Zamenhof-belvidejo en la Montaro Börzsöny kaj la Esperanto-memortabulo en Visegrád-Nagymaros. Eblis partopreni en diversaj distancoj 5 / 21 / 33 / 42 / 120 kilometraj gigadistancoj. La plenumintoj ricevis memorkarton kaj hungare kaj esperante kaj refreŝigilon ĉe la fino.

Dum la memorturniroj la Zamenhof statuo kaj memorŝtonoj estis florkronitaj aŭ ornamitaj.

La memorturnirojn partoprenis 2000 homoj, kaj multaj el ili estis regulaj revenintoj. Dum ĉiu turniro depende de la distancoj oni devis kunordigi ĉirkaŭ 10-20 helpantojn, kaj estis du helpantaj membraj organizoj Danubkurbiga Esperanto Grupo-Vác, Esperanto Asocio de Tata kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Gratulon al ili!

Johano Nagy
Hungaria Esperanto-Asocio
ekonomia vicprezidanto, afergvidanto

része volt. De mellette a távokkal számos egyéb kupamozgalomba is bekapcsolódott a Szövetség. A rendezvényen mindig jó hangulat uralkodott.

A rendezést mindig megelőzi: ötletgyűjtés, stáb megszervezése, előszervezés, amelyhez hozzátartozik az útvonaltervezés, bejárás, ellenőrzőpontok, térképmetszet készítése, hatóságoktól engedélyek bekérése, Google előnevezés, reklám és hirdetés, költségvetés készítése, forrásteremtés, csapatépítés, feladatok elosztása, adminisztrációk: nyomtatványok, eszközök beszerzése, teremfoglalás, frissítő, élelmezés – étel, ital – szalagozás, biztonságos helyszín előkészítése. A rendezés alatt is és után is számos munkafeladat van.

A MESZ 2017-től 2021 év végéig minden évszakot érintő 20 emléktúrát szervezett, több tájegységet érintve (Budai-hegység, Pilis hegység, Gerecse hegység, Börzsöny hegység, Vértes hegység), ahol eszperantó emlékhelyeket, ZEO-kat (Zamenhof és Eszperantó) mutatott meg. Ilyenek voltak a tabáni Zamenhof szobor és emlékkő, Piliscsév Eszperantó-forrás, tatai eszperantó emlékkő és eszperantó tér, börzsönyi Eszperantó-hegy és Zamenhof-kilátó, Visegrád-Nagymaros eszperantó emléktábla. Különböző távokon lehetett részt venni: 5 / 21 / 33 / 42 / 120 km. Voltak egyedi és népszerű emléktúrák, mint a gyereknapi és mikulás emléktúrák, valamint a nagyobb kihívást jelentő maratoni és 120 km-es gigatáv. A teljesítők magyar-eszperantó nyelvű emléklapot és a célban frissítőt kaptak.

Az emléktúrák alkalmával a Zamenhof szobrot és emlékköveket megkoszorúztuk vagy feldíszítettük.

Az emléktúrák alkalmával 2000 személy vett részt, közülük sokan rendszeres visszajárók voltak. Egy túra alkalmával a távoktól függően kb. 10-20 segítőt kellett koordinálni, és volt két segítő tagszervezet (Dunakanyar Eszperantó Csoport-Vác, Tata és Környéke Eszperantó Egyesület.) Nekik külön gratulálunk!

Nagy János
Magyarországi Eszperantó Szövetség
gazdasági alelnök, operatív vezető



Raporto de s-ino Maria Eszes, adiaŭinta HEA-prezidantino - kaj dankoj

Salutinte la delegitojn, membro-organizojn kaj la gastojn de la Asembleo renoviganta la funkciularon de Hungaria Esperanto -Asocio mi komencis mian adiaŭan paroladon per mia devizo:

En la silento de mia animo estas LITERATURO
En mia imagata mondo estas PENTRARTO
En mia koro vivas MUZIKO
La viviganto de mia vivo estas ESPERANTO kaj ARTO

El ĉi tiuj mi rememoris iujn gravajn eventojn rilatajn al Esperanto, kiujn mi partoprenis kiel ĉiĉeronino kaj organizanto antaŭ mia prezidanteco:



Kun kantistino Anjo Amika

JER (Junulara Esperanto Rekontiĝo - Pécs); IREN (Internacia Renkontiĝo Naturamika” - Abaliget); Nacia Renkontiĝo de Grandfamiliaj Esperantistoj (Sikonda); d-ro Gábor Bálint Esperanto Grupo (Pécs); Alp-Adriatika Renkontiĝo kaj gastigado de korea Choe Taesok tiama ĉefredaktoro de la gazeto Espero kun vilaĝa turismo (Szebény); IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (Pécs); 19a IMEK (Internacia Medicina Esperanto Kongreso) en Budapeŝto, ĉiĉeronado en la Eŭropa aranĝaĵo-ŝipo kun la organizanto s-ro Johano Nagy; Inaŭguro de Esperanto-Parko (Pécs), kie s-ro Róbert G. Nagy, la estro de DURA Esperanto Grupo transdonis la faritajn memortabulojn de la forpasintaj Esperantistoj.

Resumante mian prezidantan agadon dum la lastaj 4 jaroj mi diris: mi kredas, ke mi sukcesis helpi la Esperanto-movadan vivon en interkonsento, paco kaj amo utiligante mian sperton de pli ol 50 jaroj de Esperanto, laŭ la ideoj de Zamenhof kaj konservante, fruktodonante la spiritan heredaĵon. Mi sukcesis pliiĝi la nombron de membroj de la Asocio kun entuziasmaj membroj, kiuj ekŝatis apud mi Esperanton. Dum mia mandato, mi sentis ke mi sukcesis konstrui bonan rilaton kun nia ekzistanta membraro. Mi ĝojas, ke mi povis riĉigi la agadojn de la asocio per kulturaj programoj en la spirito de la ARTO.

Mi diris, ke mi starigis bonajn rilatojn hejme kaj eksterlande. Kiel la prezidanto de la Artista Rondo de Pécs, Amika Unuiĝo de Verkistoj kaj Poetoj esperante establi pli proksiman rilaton, mi invitis la estimatajn profesorojn de nia Asocio, profesorojn d-ron György Nanovfszky, d-ron Endre Dudich kaj d-ron Gábor Márkus, kiuj povis prezenti sin al la publiko de Pécs interesiĝanta pri ARTO kaj ESPERANTO, kadre de tre sukcesaj libroprezentadoj. Gastoj de la Artista Rondo estis vicprezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio s-ro Johano Nagy kaj la mondfama Esperantista kantistino s-ino Anjo Amika.

Nia honora prezidanto Prof. d-ro Gábor Márkus, kiel invitita honora gasto por mia memstara vespero Kun plumo, kanto kaj peniko ankaŭ en urbo Komló honorigis la ĉestantojn per sia prelego kaj prezentado de sia libro Esperante tra la mondo en la Germana Klubo. Li povis konatiĝi ankaŭ kun la historio de la urbo Komló, kiun mi prezentis por Li kiel ĉeronino sur la placo Esperanto. En la Biblioteko Attila József Li povis vidi la kolektaĵon de Esperanto libroj, donacitaj fare de nia Asocio. Ĝian akcepton ni dankas la estrinon de la instituto s-inon Gyözőné Steinerbrunner.



Dum la ekspozicio La Rilato de Arto kaj Esperanto

(ŝtongrafiko), grafikaj verkoj de la juna talenta artistino Mandula Kern, kaj ankaŭ mi prezentis miajn akrilajn pentraĵojn kaj miajn poemojn.

La ekspozicio enhavis multajn afiŝojn, kie estis videbla la historio de Esperanto vivo de la Asocio kun memoraĵoj pri Zamenhof. La relikvojn de Zamenhof kolektis s-ro Johano Nagy. Kolorigis la programon la FŌNIX ĉambrokoruso, gekantistoj s-ino Anjo Amika, EMI triopo kaj s-ro Attila Papp. Mi menciis la alian aranĝon en la Nacia Biblioteko de Fremdaj Lingvoj, kie estis interesa programo, okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj kaj mi ankaŭ realigis la ĉiujare organizitajn Zamenhof festojn, dankante al Johano Nagy.

Mi emfazis starigante eksterlandajn rilatojn, ke laŭ la interkonsento kun KEL (Kroata Esperanto Ligo) mi reprezentis la Asocion ĉe la 20a Alp-Adriatika Konferenco en urbo Velovár, kie mi prelegis kun la titolo Rilato inter religio kaj arto. La ĉambrokoruso FŌNIX direktata de s-ino Gabriella Cs. Gillich kun mia manaĝerado gajnis la 3-an lokon en la 8-a Euxropa Esperanto Kanto Festivalo. Mi dankis S-ron Zoltán Jégl, la prezidanton de la „Respekto al Komló Unuigxo” pro la helpo al kroata vojaĝo kaj kunlaboro por Esperanto.

Mi menciis, ke mi publikigis pri la konferenco en la gazeto Hungara Fervojista Mondo redaktita de s-ro István Gulyás. Mi dankis Lin pro la publikigado.

Pluraj miaj pentraĵoj kaj verkoj estis publikigitaj en la lastaj jaroj en la gazeto JUNA AMIKO. Mi dankis s-inon Malgosia Komarnicka.

Sub la gvidado de d-ro Cristoph Klawe, prezidanto de Universala Medicina Esperanto-Asocio mi havis korespondadon kun s-ro Hori Jasuo, honora membro de UEA, kiel kantverkisto, kies kantoj povis aldoni koloron al niaj eventoj helpe de nia FŌNIX ĉambrokoruso.



ĉambrokoruso Fŏnix – Ili gajnis la 3-an premion dum la kantokonkurso.

Mi havis korespondadon kun kroata esperantisto s-ro Josip Pleadin, kiu estis invitita gasto de nia Asocio por la memorekskurso Zamenhof, organizita de nia vicprezidanto s-ro Johano Nagy. Mi diris, ke mi tre ĝojas, ke HEA malfermis pordegon al civiluloj per tiuj ĉi memorekskursoj, kiuj vekas pli kaj pli da intereso pri Esperanto, kaj samtempe alportas ankaŭ sukceson.

Mi havis rilaton kun la Korea Esperanto-Asocio, sed mi ne povis vojaĝi al la 102a Universala Kongreso de Esperanto en la malproksim-orientan Seulon, bedaŭrinde pro mia malsano, sed la filmon, kiun mi faris, prezentis anstataŭ mi nia vicprezidanto s-ro Johano Nagy.

Kiel la prezidanto de HEA mi dankis pro la fido al mia 4jara prezidantaro. Mi diris, ke mi certas – kiel esperantistino mi estas eterna esperanto – la rilatoj establitaj estos kultivatataj de la nova prezidantaro kaj la kunlaboroj daŭre fruktodonos en la estonteco.

Mi lasis kelkajn memorigajn pensojn por ĉiuj. Se ni volas resti bonaj esperantistoj, ni legu ĉiutage poemon en Esperanto, ĉu tradukitan de nia forpasinta prezidanto s-ro Imre Szabó, ĉu prozon, romanon de nia estimata artradukisto s-ro Jozefo Horváth, aŭ de d-ro György Nanovfszky, d-ro Gábor Márkus, d-ro Imre Ferenczy, s-ino Éva Tófalvy, s-ino Lászlóné Pásztor kaj mi proponis la gazetajn artikolojn pri Esperanto-vivo de s-ro István Gulyás, redaktoro de la gazeto Hungara Fervojista Mondo.



Mi atentigis pri la sin-oferaĵoj, senlacaĵoj kaj ekzemplodonaj, entuziasmaj laboroj de d-ro Lajos Molnár kaj d-rino Julianna Farkas, gvidantoj de la 52 jara Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo, kiuj helpis la funkciadon de HEA per siaj multjaraj spertoj sen rigardi penon kaj tempon. Mi deziris al ili bonegan sanon por ilia plua, sukcesa laboro.

Mi menciis s-inon Katalin Faragó, kiu estas la honora membro de UMEA, membro de UEA, Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo kaj HEA, la fondintino de la YUMEIHO Unuigo. Mi havis tre bonan rilaton kun ŝi, kiel kun la hungara reprezentanto de la Centro Tokio. Mi atentigis pri ŝiaj jardekoj da sukcesa aranĝista sperto kaj senlaca laboro por Esperanto. En la nomo de la estraro mi deziris al ŝi bonan sanon kaj sukceson por la organizado de la sekvontjara 22a Internacia Medicina Esperanto-Kongreso, Hódmezővásárhely.

Mi rekomendis al ĉiuj aŭskulti muzikon, kantojn de la mondfama, mirinda sono kantistino s-ino Anjo Amika, kaj admiri la pentraĵojn kaj artajn verkojn de talentaj Esperantistoj.

Antaŭ la adiaŭo mi dankis s-ron Róbert G. Nagy, estron de la DURA Esperanto grupo pro la ofera, senlaca laboro por redaktado de WIKIPEDIO - kie ankaŭ mi povas ĉeesti - kaj mi dankis s-inon Károlyné Ködmön pro la multjara diligenta, senlaca laboro, kiel ĉefdelegito de UEA kaj pro la prezentado de ŝiaj belegaj pentraĵoj. Mi deziris al ili pluan sukcesan laboron kaj bonan sanon.

Mi dankis ĉiujn gesamideanojn por ilia helpo certigi, ke la estraro povu plenumi sian laboron glate, kaj senlace batali por la akcepto kaj la instruado de la lingvo, por estonteco de la lingvo Esperanto.

Mi dankis la ĝeinstruistojn, kiuj instruas Esperanton, pro ilia laboro. Mi deziris havi multajn studentojn en la estonco, kiuj dum la lernado ekŝatas la lingvon kaj eble fariĝos entuziasmaj membroj de la Asocio. Mi deziris al la ĝeinstruistoj paciencon, sanon kaj sukceson.

Mi speciale dankis al la prezidantaro pro la kunlaboro por plenumi nian celon. Al s-ino Edit Lindwurm la ĝenerala vicprezidanto de nia Asocio pro ŝia diligenta, entuziasma, multjara laboro, al s-ro Jozefo Eszényi estrarano pro la redaktado de la hejmpaĝo de la asocio, al s-ro Kálmán Romcsek ankaŭ pro la provizado de sontekniko okaze de ĉiuj niaj eventoj.

Mi dankis nian mortintan estraranon s-inon Enikő Sereghyné Zengő pro ŝia ofera laboro. Ni konservas ŝian empatian personecon kun pieco, kaj ni daŭrigos ŝian laboron senlace. Mi rememoris pri la entuziasmaj Esperantistoj, kiuj bedaŭrinde jam mortis. Ili rigardas nin de tie kaj lasante siajn spiritaĵojn valorojn ĉi tie, daŭre helpas nin sur la vojo kiun ili faris kaj batalis por estonteco de Esperanto.



Dum Zamenhof-festo kun Julianna Farkas kaj János Nagy

Fine mi dankis s-ron Johano Nagy, afergvidanton, ekonomian vicprezidanton de HEA pro lia diligenta, entuziasma, pacienca, sindonema laboro por certigi ke la oficialaj aferoj de la Asocio estu solvataj glate. Mi deziris al li bonan sanon por lia plua sukcesa laboro.

Adiaŭe mi deziras, ke ĉiuj esperantistoj verŝu amon en siajn korojn kaj konservu ĉi tiun ideon: La Esperantisto ĉiam helpas! KUNE, RIGARDANTE UNU LA ALIAN, KUN KOMPRENO, RESPEKTANTE HOMOJN! Nur tiel povas realiĝi la ideo de nia lingvo-fondinto ZAMENHOF la ESPERANTO.

Konklude mi transdonis la saluton de d-ro Gábor Márkus, honora prezidanto de la Asocio por la delegitoj kaj dankon por la ekŝiginta estraro pro la sindonema laboro. Li elstarigis la oferan, konstantan laboron de s-ro János Nagy kaj laŭdis la sukcesan subtenon de la Asocio en eldonado de 15 volumoj de la libroserio Esperante tra la mondo.

Mi deziris al la nova estraro, ke la rilato inter ESPERANTO kaj la ARTO daŭre fruktodonu kun la neelĉerpebla kreemo de niaj esperantistaj kreintoj, kaj per atingado de la novaj celoj planitaj de la nova prezidantaro. Mi gratulis ilin kaj mi deziris al ili fruktodonan, sukcesan, pacan kunlaboron en la estonteco kaj bonan sanon al ĉiuj.

Fine mi dankis la afablan atenton.

Atentu, zorgu unu pri la alia!
Mi adiaŭis per mia poemcitaĵo:

Maria Eszes:
Nova tago - espero
-Finite-! jam preskaŭ mi kredis
-Tamen ne-! la sorto objetis
Venos nova tago brile
La morgaŭ belos plie!

ĜIS REVIDO!
Maria Eszes



Invitilo - Meghívó

Hungaria Esperanto-Asocio
ĝoje invitas Vin kaj vian familion
al Zamenhof festo.

Loko: Oficejo OKISZ, strato Thököly n-ro 58-60,
Budapeŝto, XIV-a distrikto
Tempo: je la 11-a horo, la 12-an de decembro
2021

Programo:

11:00 La Espero (komuna kantado de la himno kun
piana akompano)

Festparolo de la prezidanto: István Szabolcs >>

11:20 Blazio Vaha: Zamenhofaj vojo kaj temaro

11:40 Miklós Simonyi: Zamenhof: La Vojo
(recitado)

11:45 Giorgio Silfer: HEROLDO centjaras

12:05 Stefan MacGill: EKO kaj AMO – raporto

12:25 Boris Arrate Veranes: Kristnasko en Kubo

12:30 Perla Mielo kaj Ladislao Garamvölgyi
kantás kaj muzikas

(kontribuas lernantoj de la Muziklernejo László
Lukin de urbo Érd)

Post la festa kunveno oni povos laŭdezire
honorviziti la monumenton de Zamenhof.

Ĉiuj estas kore atendataj!

Johano Nagy
vicprezidanto, afergvidanto

A Magyarországi Eszperantó Szövetség
szeretettel meghívja Önt és kedves családját a
Zamenhof ünnepségre.

Helyszín: 1146 Budapest, Thököly út 58-60.
OKISZ irodaház
Időpont: 2021. december 12. vasárnap 11:00 óra.

Program:

11:00 Eszperantó himnusz (közös éneklés
zongorakísérettel)

Szabolcs István elnök: ünnepi köszöntő >>

11:20 Wacha Balázs: Zamenhof útja és témái –
előadás

11:40 Simonyi Miklós: Zamenhof – La Vojo
(szavaltat)

11:45 Giorgio Silfer: 100 éves A Heroldo újság

12:05 Stefan MacGill: EKO, AMO – beszámoló

12:25 Boris Arrate Veranes: Karácsony Kubában

12:30 Mézes Gyöngyi és Garamvölgyi László
zenés előadása énekkel, gitárral, zongorával,
ütőhangszerekkel.

A programban közreműködnek az érdi Lukin
László Zeneiskola ütőhangszeres növendékei.

A rendezvény után a Zamenhof szobornál
mindenki egyénileg tiszteletét teheti.

Mindenkit szeretettel várunk!

Nagy János
gazdasági alelnök, operatív vezető



L.L. Zamenhof

Festa parolo de nova prezidanto de HEA en Zamenhof festo la 12an de decembro 2021, Budapeŝto

Karaj Gesamideanoj,

en la nomo de la nova estraro de HEA kaj mi mem, mi kore bonvenigas la kunvenintojn por festado de la 162-a datreveno de la naskiĝo de nia Majstro, Ludoviko Lazaro Zamenhof. Pere de vi mi bonvenigas la membraron de HEA, ĉiujn hungarajn esperantistojn, esperantistojn loĝantajn en najbaraj landoj, iliajn asociojn, organizaĵojn, ĉiujn esperantistojn en Eŭropo kaj en la mondo, kaj ĉiujn simpatiantojn de nia afero.

Kun granda plezuro mi salutas niajn eksterlandajn gastojn festantajn kune kun ni, sinjorinon Perla Martinelli, ĉefredaktoron de Literatura Foiro kaj prof. Giorgio Silfer, prezidanton de la Civito, s-ron Stefan MacGill reprezentaton de UEA respondecan por la landa agado, kiun mi ne scias, ĉu mi entute menciui inter niaj eksterlandaj gastoj, li ja vivas jam de jardekoj inter ni... kaj la samon mi povus diri salutante s-ron Boris Arrate Veranes el Kubo.



Antaŭ la Zamenhof-festo la nova estraro de HEA

Fari festan paroladon estas por mi preskaŭ emocie neeltenebla tasko. Antaŭ kvindek jaroj, la penso mondosavanta engravuriĝis en mian cerbon, finokupis mian menson, plenigis mian animon, kaj nun mi povas stari ĉi tie antaŭ la festanta publiko kaj scii kaj diri, ke la grandaj aferoj estas ankoraŭ antaŭ ni! Estas grandaj aferoj antaŭ ni! Kie Esperantujo, tie estas la feliĉo!

„Gloron al nia Majstro en la Alto! Lin laŭdu tero kaj ĉiela lum’!”

Certe Vi ĉiuj rekonas la du komencajn versojn el la Tragedio de l’Homo, drama poemo de Imre Madách. La traduko de la Tragedio de l’Homo finpretis jam, kiam la lingvo Esperanto ankoraŭ ne atingis la plenkreskan viriĝon, sed tiu jam komencis havi decidan influon sur la evoluon de Esperanto kaj, pere de ĝi sur la Eŭropan kulturon. Sen Esperanto la Eŭropa kulturo estus multe pli malriĉa hodiaŭ. Tamen la hipokritaj oficistoj de la Eŭropa Unio, ankoraŭ ofte asertas, ke Esperanto ne havas la kulturalan fonon, kiun havas la tiel nomataj naturaj lingvoj.

Laŭ Géza Bárczi, la plej granda hungara lingvisto de la jarcento, la Esperanta traduko de la Tragedio estas multe pli sukcesa ol la franca traduko. Tio fiksiĝis forte en mia adoleska cerbo kaj ekde tiam mi ne povas deklami ĝin laŭ la originala hungara versio.

„... Kalocsay karesas la vortojn kvazaŭ multekostajn ŝtonojn, ŝanĝante ilian brilon laŭ la lumfalo kaj inkrustante ilin en siajn versojn, ĝuste sur tiu loko, kie ili ravas la rigardon.” (G. Waringhien)

Sen kono de la Tragedio oni ne povas trakti la Esperantan literaturon. Sen koni la Tragedion en Esperanto-traduko ankaŭ William Auld – mi certas – ne scipovus verki sian ĉefverkon „La infana raso”, kiun jardekojn poste tradukis al la germana Clemens Setz, artisto de la germana lingvo, laŭreato de la ĉi-jara Germana Literatura Grandpremio. Setz konsideras ĝin ĉefverko de la monda literaturo, afiŝante ĝin ĉie kie li nur iras kaj prelegas pri la mondvalora Esperanto-literaturo, paralela mondo malkovrinda kaj malkovrenda kandidatigante Spomenka Štimec, kroatan verkiston por la Nobel-premio. Setz ne estas Esperantisto. La duvizaĝaj bruselaj burokratoj regardas siajn antaŭjuĝojn.

Paĉjo nia, Julio Baghy sub la forta influo de Madách, estante en sama psika stato en kiu Madách troviĝis dum sia tuta vivo ĉefe post la falo de la Revolucio kaj Liberiga Milito en jaroj 1848-49, dum la morna historia tempo en vintro de 1956-57 surpaperigis siajn sonĝojn (Sonĝe sub pomarbo) – kiu estas ĉefverko de la Esperanta drama poezio.

William Auld neniam aŭdis pri Madách ĝis La Tragedio de l’Homo atingis lin en Esperanta traduko. De tiam li estas ŝatanto de la hungara literaturo. Sed poste li serĉis ankaŭ la anglan tradukon de la verko kaj sian opinion pri tio li resumis jene: „se mi (pli frue) konus (jam) la verkon de Madách en la traduko de ĉi tiu buĉisto, mi ne interesiĝus pri la hungara literaturo”. William Auld estis kandidatigita trifoje por la literatura Nobel-premio.

Kálmán Kalocsay estis premiita de la Hungara PEN-Klubo kun memormedalo por esperantlingva disvastigo de hungara literaturo eksterlande.

Tamen publikigante en novembro 2005, la Komunikon pri Nova Kadra Strategio por Multlingvismo kaj Komunikado, la Eŭropa Komisiono prezentas intelektan antaŭjuĝon en la fama kaj fifama piednoto 5, asertante, ke „... la Komisiono ne subtenas la uzon de artefaritaj lingvoj, ĉar ili ne havas kulturen fonon pro sia naturo.” Esperantistoj prave indignas kaj protestas kontraŭ tiu konstato, sed vane. Eksaj komisionanoj pli malfrue – nomoj estas abomenindaj – koncedis kaj konfesis, ke ili estis „misinformitaj, misgviditaj” de siaj iamaj subuloj. Burokratoj ankaŭ hodiaŭ ofte orientiĝas al falsaj padoj. Daŭre plu regas la forta konvinko en la EU-Komisiono, ke Esperanto estas „malkompleta lingvo, sen vera kulturo, sen sufiĉe da fakvortoj”.

Esperantistoj prave indignas kaj protestas kontraŭ la aserto, ĉu vane? Tute ne!
Ankaŭ la parolado de (iu) ekskomisiano bonveniganta la 101-an Universalan Kongreson de Esperanto en Nitra pravas, ke informiĝo pri faktoj povas ŝanĝi vidpunktojn.

Por nia memestimo, ni povus havi specon de kontentigo kaj kontentiĝo pro la amasa subteno de niaj proponoj por la nuna Konferenco pri la Estonteco de Eŭropo. Temas pri la rekono de Esperanto kiel unu el la kulturaj lingvoj de Eŭropo. Nenio alia povus esti pli bela rememoro pri la naskiĝtago de nia Majstro, ol se esperantistoj donus tuj sian subtenon al la propono, hejmenirinte post la solenaj naskiĝtagaj festoj! Tiu devas esti la plej sukcesa propono de la Konferenco, kvankam alia, pri la propedeŭtika rolo de la lingvo, jam havas bonan ŝancon fariĝi tio. Ideoj de ambaŭ proponoj formas kernpensojn de la programo de HEA – ja ili reprezentas ankaŭ gravajn hungarajn interesojn.

Ne forgesu subteni la hungaran proponon pri edukado ne nur pro nia baza principo pri solidareco sed pro ĝia elstara, valora enhavo!

Karaj Gesamideanoj,

Komenio, kaj poste la grandaj mensoj, saĝuloj de Klerismo, kaj ankaŭ Neŭtono ne dubis eĉ por unu momento, ke eblas krei facilan, internacian lingvon por internacia komunikado. Tamen nia majstro sukcesis krei ion el la Granda Libro. Endre Ady deklaris en 1906 ke „La lingvo esperanto prezentas al la mondo civilizata la sole veran solvon de lingvo internacia” kaj starigas demandon: Sed ĉu ĝi estas sufiĉe simpla, sufiĉe fleksebla kaj sufiĉe bela? Li mem ja scias, jes „simpla, fleksebla, belsona”. Estante nenies kaj ĉies lingvo samtempe – ĝi kreas egalajn rajtojn kaj ŝancojn en la komunikado ne nur inter nesamlandanoj sed ankaŭ inter alitavolanoj de la socio. La lingvouzo estas la respondeco de la individuaj esperantistoj, sed esperantista komunumo klopodas agordi ĝin kun la Fundamento. Kaj tion ni nomas la bona lingvo. Nia Majstro ne simple inventis la belsonan internacian komunikilon, plenumis la sonĝon de la Homaro, sed li inventis la „bonan lingvon”.

Mi legas ie: dum por stilo komuna validas la devizo „necese kaj sufiĉe” kaj „en stilo faka regas la devizo” „koncize kaj precize”, en arta stilo funkcias la regulo „abunde kaj redunde”. Ĉu tio veras? Jes tio veras kaj ne veras, kaj mi ne scias. Kien kun Paĉjo? Kaj Spomenka Ŝtimec? Kaj mia karmemora antaŭulo Imre Szabó?



Antaŭ la festparolo

Mi neniam ĉesos admiri lian tradukon de „Odo” – „svarmas al mi are la iamo”, en kiun frazon ĉio estas enmetita, enpakita pri nia lingvo, ĉiu eco, trajto kaj senco kaj inĝenieco, lerteco, sed entute genieco de nia Majstro – de la „lingvo bona”. Mia konsilo : neniam rezignu pri la lingvo bona!

La festo kaj kristnasko estas tre proksimaj en la kalendaro, simbole proksimaj. Estu tiel en niaj pensoj kaj animo. Estu nia kompasoj la devizo por nia ĉiutaga vivo:

„Patrino kaj landa asocio” estas nur unu.
Vivu Zamenhof! Vivu lia memoro! Vivu la Movado!

Mi solene malfermas nian feston de la 162-a naskiĝtago de nia Majstro, Ludoviko Lazaro Zamenhof.

István Szabolcs
prezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio

EKO 2021-47 sendita el Budapeŝto la 6an de novembro

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkrôçaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

La Tago de Toleremo, la 16an de novembro

Universala Esperanto-Asocio, okaze de la Internacia Tago por Toleremo, **la 16-an de novembro 2021**, memorigas pri la celo de Unuiĝintaj Nacioj kaj UNESKO antaŭenigi interkompreniĝon inter kulturoj kaj popoloj. Tiu celo estas en la kerno de la Ĉarto de UN kaj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, ĉar toleremo estas bazo por paco, plena observo de homaj rajtoj kaj daŭripova evoluigo por ĉiuj.

Toleremo estas respekto, akcepto kaj aprezo por la riĉa diverseco de kulturoj de nia mondo, de niaj formoj de esprimo kaj niaj manieroj esti homoj. Do, ni devas harmonie interagi kaj kunlabori por konstrui malfermajn kaj sekurajn komunumojn por ĉiuj.

Toleremo estas pli kaj pli necesa antaŭ la nuntempaj defioj. Antaŭ klimata krizo, sankrizo, perforta migrado, rasismo, ekstremismo kaj aliaj defioj, ni ĉiuj devas lerni pri diverseco kaj malfermiteco, kaj malkovri la kulturojn kaj kredojn de aliaj. Ni bezonas pli bonajn leĝojn, edukadon, aliron al informoj, kaj konsciigon.

Por esti toleremaj, ni bezonas kompreni unu la alian. Pro tio, UEA antaŭenigas multlingvismon kiel vojon por multoblige la eblecojn de plena interkompreniĝo. Speciale, ni utiligas Esperanton kiel ponton inter malsamaj lingvoj kaj kulturoj. Ni ĉiuj estas anoj de la sama mondo, tiel ni devas ĉiutage strebi, individue kaj komunume, al konstruado de la bezonataj toleremo kaj interkompreno.

Per vera toleremo, kiel diris la fondinto de Esperanto pri la parolantoj de lia lingvo, "... ni, membroj de la plej malsamaj popoloj, staras unu apud alia ne kiel fremduloj, ne kiel konkurantoj, sed kiel fratoj."

Esperanto por UN

Fonto: La komunikejo de la UN-oficejo de UEA : <https://unesperante.wordpress.com/>

En tiu retejo vi trovas valoran arkivon de datrevenoj, eventoj kaj aliŝoj!

Filmeto pri Zamenhof

Spektu tiun ĉi filmeton pri la vivo de Ludoviko Zamenhof kaj, se vi volas, dissendu ĝin al viaj Esperantlingvaj geamikoj aŭ prezentu ĝin dum viaj klubkunvenoj.

<https://www.facebook.com/100014743428404/posts/1190524351449001/?sfnsn=mo>

J. Haazen, Belgi

La Zamenhofa festo en Togolando

Tio okazos en Zowla en la 18a de decembro. La kotizo estas almenau 1.000 F (ĉirkaŭ 1,6 eŭroj). La kotizon oni disponigu al estraranoj de UTE aŭ al membroj de la organiza grupo aŭ s-ro DOUMEGNON Koffi aŭ f-ino-GBEGLO Aminda ene de Instituto Zamenhof. Ĝis la 10a de decembro 2021. La programo enhavos futbalmatĉon, diskut rondon kun la temo 'Aplikado de Esperanto en la ĉiutaga vivo de la homo' kaj grupa fotiĝo.

Afriko partoprenis en la Virtuala Kongreso de UEA

<https://youtu.be/wtnsfkLJJ5E> Moses Byamungu prezentas novan stilon en Esperantujo! Tiu prezento estis pretigita okaze de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), kiu okazis en julio 2021.

Plia kanto el la Belartaj Konkursoj

Kajto kantis „Bela rev” en la Ceremonio de Disdono de Premioj de la Belartaj Konkursoj de UEA 2021. La teksto de Ewa Grochowska ricevis Honoran Mencion en la branĉo 'Kantoteksto'. Nanne Kalma komponis la muzikon.

https://youtu.be/WQ0scawW_SQ

Nederlanda trezono de la Libroservo de UEA

La 20-an de oktobro 2021 Hans Warren 100-jariĝus: Hans Warren (1921-2001) estis nederlanda aŭtoro. En 1989 aperis en Esperanto lia "Ŝtono de Helpe", ĉe Esperanto-Kultura Servo, Hago, laŭ traduko de unu el niaj majstroj, Gerrit Berveling. Ĝi disponeblas en la Libroservo de UEA: <https://katalogo.uea.org>. Malkovru trezorojn! Bonvenu viziti kaj aĉeti en nia Libroservo. Bildo en la PDF.

Ŝtono de Helpe: <https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=3632>

Hans Warren (Vikipedio): https://eo.wikipedia.org/wiki/Hans_Warren

Fernando Maia Jr., Vicprezidanto de UEA

Afriko kaj ĝia tutkontinenta bulteno

Jen la prelego pri *Esperanto en Afriko* de Adje Adjevi, kun emfazo pri la agado de la Afrika Komisiono de UEA.
<https://www.youtube.com/watch?v=8nRtv7tY6ss>

La Hispana kongreso – trezorejo de prezentaĵoj

Marisol Soriano González parolas pri "Lingvaj rajtoj kaj Esperanto" en la virtuala okazigo de la 79a Hispana Esperanto-Kongreso.
<https://youtu.be/-wpsfl2yR30>

Franca informilo kaj dulingva revuo

Finfine ni sukcesis eldoni novan version de *Le Monde de l'espéranto*.
Jen ĝi ĉe la retejo de Esperanto-France: <https://esperanto-france.org/LME-608-609>

Uzbekio vaste informas pro esperantista reagemo

La Internaciaj Letertagoj "Vorto pri Samarkando – 2021", dediĉitaj al la Tago de la Urbo, plene sukcesis. Interalie, ĉi-jare la Tago de Samarkando jubileas; ĝi estis establita precize antaŭ 25 jaroj, en oktobro 1996. Alvenis multnombraj gratul-leteroj kaj aliaj materialoj el plej diversaj partoj de la tergloba. Same kiel antaŭe, la letertaga projekto estis adresita ne nur al la Eo-komunumo, sed ankaŭ ekstermovaden. Ankaŭ ĉi-foje pli ol duono de la kontribu-intoj estis diverslandaj neesperantistoj. Inter ili estas konataj verkistoj, poetoj, sciencistoj, honoraj civitanoj de Samarkando. Pluraj leteroj aperis en nialandaj paperaj kaj retaj periodaĵoj.

Temas pri grandampleksaj materialoj (formato A3 kaj eĉ pli) Vidu la ĉi-subajn retligilojn:
- <https://www.facebook.com/sam.vestnik/photos/a.150744985271502/1542519239427396>
(Facebook-paĝo de la regiona ĵurnalo "Samarkandskij Vestnik" ("Heroldo de Samarkando"))
- <https://sv.zarnews.uz/post/slovo-o-samarkande-2021>
(retejo de la regiona ĵurnalo "Samarkandskij Vestnik")
- https://kultura.uz/view_2_r_17067.html- https://kultura.uz/view_2_r_17094.html

GRAVA KAJ VALORA KONFERENCO de la AKADEMIO de ESPERANTO – vidu la alkroĉaĵon – 14-15 novembro

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la 17a aŭgusto 2021 (per EKO 2021-34). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉesto en la ekspedolistoj.

Stefan MacGill

Respondecoj UEA: Landa Agado

Respondecoj ILEI: EKO-komunikoj kaj informoj pri Sekcioj

Atingoj etaj, sed konkretaj



KULTURAJ RILATOJ KUN ORIENTA AZIO

Dum multjardeka tradicio Hungaria Esperanto-Asocio havas fortajn internaciajn kulturajn kunlaborojn kun orientaziaj landoj. La afero komenciĝis en la okdekaj jaroj dum la lasta jarcento kiam mi havis eblecon partopreni doktorigan programon en japana universitato per Esperanto-stipendio. Tiam Waseda Yutaka, fama esperantisto kaj SAT-ano estis la direktoro de Entrepreno Verda Stelo en sudjapana urbo Nagoya, kaj li finance subtenis mian universitatan programon en la altprestiĝa katolika Nanzan Universitato.

Post la sukcesa fino de mia studprogramo oni ofte invitis min prelegi en diversaj japanaj, ĉinaj, kaj koreaj universitatoj kaj aliaj sciencaj kulturaj organizaĵoj. Dum la komunisma epoko mi povis viziti nur Japanion, Ĉinion kaj Nordan Koreion, sed mi tute ne havis eblecon akcepti inviton de Lee Jungkee, tiama ĉefsekretario de Korea Esperanto-Asocio en Seulo. Tiam ni havis fortajn kulturajn kaj sciencajn kunlaborojn kun Orienta Azio. Laŭ nia invito ĉina profesoro Shen Chenru, japana profesoro Mizuno Yoshiaki kaj korea profesoro So Gilsu prelegis en niaj universitatoj en Budapeŝto kaj la lingvo de la prelegoj estis Esperanto.

Sed ne nur la sciencaj kaj kulturaj rilatoj estis fortaj sed ankaŭ la turismaj kaj interreligiaj. David Macgill, la patro de la tiama UEA direktoro Stefan Macgill vivis tiam en budhisma monaĥejo en Kyoto, kaj laŭ liaj invitoj eŭropaj esperantistoj povis viziti tiun monaĥejon per Pasporta Servo. Laŭ invito de nia Hungaria Esperanto-Asocio ofte venis orientaziaj (ĉefe japanaj) turistaj grupoj al Budapeŝto, kiuj povis vidi la kulturan heredaĵon de Centra Eŭropo pli malmultekoste ol aliaj turistaj grupoj.

Post la falo de la komunisma sistemo en Orienta Eŭropo nia Hungaria Esperanto-Asocio havis eblecon konstrui bonajn kaj fruktodonajn internaciajn kulturajn rilatojn ankaŭ kun Suda Koreio. Tial mi povis plenumi mian promeson al Lee Jungkee, jam prezidanto de Korea Esperanto-Kulturcentro por viziti Seulon. Unue mi ĉeestis la Internacian Meditadan Renkontiĝon, kiun la Esperanto fako de Uxonbulisma Religio organizis, kie mi ricevis nekredible bonajn spertojn kaj pro tio mi decidis ĉeesti ĉiujn similajn kunvenojn dum la lastaj dek jaroj.

Sed ne nur mi kontribuis al la evoluigo de tiuj kunlaboroj. Ankaŭ Sereghy Enikő, tiama estrarano de HEA vizitis Seulon kaj gastprelegis kaj gvidis kurson por koreaj esperantistoj. Laŭ la invito de KEA ankaŭ Eszes Mária, la honora prezidantino de nia asocio preparis prelegon por la UK en Seulo, sed pro ŝia neatendita malsano Nagy Janos, vicprezidanto laŭtleĝis la prelegon. La prelego temis pri la pentroarto, poezio kaj Esperanto, kaj la orientazia aŭskultantaro ĝuis aŭskulti la pensojn de centreŭropa artistino kiu alvenis el alia kulturo.

Ankaŭ la turismaj rilatoj forte pligrandiĝis dum la lastaj dudek jaroj. Hungara karavano vojaĝis al Seulo por ĉeesti la korean UK-on, kaj tutaj koreaj lernejoj klasoj venis al Budapeŝto por konatiĝi kun la Eŭropa kulturo. Tiu ekskurso estis parto de la oficiala studprogramo de korea supermezlernejo, kaj la studentoj venis al Budapeŝto kun iliaj instruistinoj. Tiam ili gastigis en la Budapeŝta Esperanto-Kastelo, kie ili ne nur tranoktis, sed ankaŭ kune kuiris, studis, kantis kaj ekzercis la uzadon de nia internacia lingvo.

Sereghy Zengő Enikő, Lindwurm Edit kaj Nagy János organizis sukcesajn internaciajn junularajn renkontiĝojn en orienthungaraj urboj Nyíregyháza kaj Jászberény, kie multnombraj koreaj karavanoj ĉeestis kaj kontribuis al la programoj. Dum la sama tempo laŭ la propono de Kara An, ĉefredaktoro de korea organo *Solidareco* oni petis ke mi enkonduku la instruadon de Esperanto en la Indramang Universitato, kiun fondis la fama, unumil ducentjaraĝa budhisma monaĥejo, kiu nomiĝas Silsangsa. La kursoj tie estiĝis efikaj kaj sukcesaj, kaj pro tio oni petis, ke mi instruu ankaŭ la anglan lingvon en la supermezlernejo de la sama monaĥejo. Krome, mi gvidis Esperanto-kurson ankaŭ en la ĉefurbo, kaj la distanco inter la Silsangsa kaj Seulo estis pli-malpli kvarcent kilometroj. Pro tio ofte okazis ke post la fino de mia kurso en Seulo mi kaptis noktan buson al la Silsangsa kien mi alvenis je la kvara horo frumatene kaj poste komencis mian kurson en la supermezlernejo je la naŭa horo. Ĝis la kovid pandemio mi povis persone ĉeesti la eventojn en la Orientazia Esperantujo, sed antaŭ du jaroj ĉio ŝanĝiĝis.

La prezidanto de la LKK de la japana kongreso petis, ke mi fariĝu unu el la prelegantoj de tiu kongreso kaj mi prezidu forumon por trarigardi la japanajn-koreajn interrilatojn. Mi prepariĝis por tio sed pro la pandemio mi povis fari tion nur per interreto. La samo rilatas ankaŭ al mia korea lingvoinstruado. Dum ĉi tiu jaro, en 2021 mi gvidis kursojn nur per interreto. Antaŭ monatoj mi gvidis du kursojn por koreoj semajne. Tie ni provis evoluigi la parolkapablon de la kursanoj dufoje semajne, sed post la fino de tiuj kursoj en ĉi tiu sezono ni havas specialan konversacian retkunvenon nur unufoje monate. Malgraŭ la malfacilaĵoj mi esperas, ke la pandemio finiĝos iam, kaj poste la membroj de nia Hungaria Esperanto-Asocio denove persone povos kontribui al la evoluigo de la orientazia movado, kaj nia asocio denove povos inviti orientaziajn esperantistojn por konatiĝi kun la centreŭropa kulturo.

Dr. Márkus Gábor

La Budapeŝta Medicina
Esperanto-Fakgrupo



tre dankas la esperantigon al
Kornélia Nagy, Thierry Salomon,
D-ro Ludoviko Molnár

Aforismoj, rimfabriko por nia sano

Mi kuretas aŭ fosas mian ĝardenon, tiel malaltigas mian sangopremon.
Mi kuretas aŭ fosas mian ĝardenon, malaltiĝas mia sangopremo.
Se la reno estas febla: fortigu Vin mia kara.
Se malfortas miaj renoj, mi devas hardi, trejni senhezite!
Mi anhelas, aer' mankas; mi gimnastikas kaj montgrimpas.
Pulmoj miaj songegas, la aero ne sufiĉas: gimnastiku, pinton grimpu!
Mi toleras montgrimpadon: malaltiĝis sangsukero kaj la graso.
Mi toleras montetgrimpon, malaltiĝas sukero kaj grasogrado.
Dikeco kaj diabeto: ili estas duonfratoj.
La dikeco kaj diabeto estas kiel duonfratoj.
La korpa ekzerco estas vera panaceo.
Jam scias Paŭlo, Bea: moviĝo estas ĉion saniga.

„Támogassa a Magyarországi Esperantó Szövetséget!

Tisztelt Olvasók!

Magánszemélyként idén is dönthet úgy, hogy a megfizetett személyi jövedelemadójának 1%-át felajánlja egy regisztrált civil szervezetnek. Kérjük, adója 1%-ával segítse a Magyarországi Esperantó Szövetség munkáját!

Legyen szó tagtársunkról vagy bármely személyről, akinek fontos a Magyarországi Esperantó Szövetség munkájának segítése, arra kérjük, hogy támogassa szervezetünket az 1 % felajánlásával! Az adóbevallás elkészítésekor a „*Rendelkező nyilatkozat a befizetett adó egy százalékáról*” formanyomtatvány kitöltésekor kérjük, hogy a Magyarországi Esperantó Szövetség adószámát tüntesse fel.


A kedvezményezett adószáma: **19003142-1-42**

Köszönjük!



„Az alábbi linkre kattintva a rendelkező nyilatkozat letölthető.”

https://esperantohea.hu/wp-content/uploads/2021/11/mesz_szja_1_szazalek.pdf

 Hungara Bulteno * Oficiala
bulteno de Hungaria Esperanto-
Asocio * 1a jarkolekto 3a numero
* esperantohea.hu * Tel.: + 36 70 932 7464

Respondeca ĉefredaktoro: Anna Bartek.
Eksteraj artikoloj bonvenas.
Redaktofino: la 20-a tago de ĉiu monato.
Redakcio: hungario@gmail.com (Ni preferas retleterojn al vokoj.)